OBSTINA, OBSTINA, OBSTINA AZENETO

Ho, kiom obstina estis tiu azeneto Alfabet! Oni diris al ĝi:

– Blanka.

Sed ĝi diris:

– Nigra.

Oni diris:

– Hodiaŭ estas bonega vetero, ĉu ne?

Sed ĝi respondis:

– Baldaŭ pluvos.

Paroli kun azeneto Alfabet povis neniu. Ĝi superobstinus kiun ajn.

Foje venis al la azeneto porkido Gruntil kaj diris:

– Vi, azeneto, estas obstina, sed mi estas pli obstina ol vi!

– Ne, Gruntil, mi estas – la plej obstina!

Tiam la porkido prenis el la poŝo de sia jaketo pomon kaj metis ĝin sur tablon.

– Ni interkonsentu tiel, – ĝi proponis, – kiu igos la alian formanĝi la pomon, tiu estas la plej obstina.

– Ni faru tiel. Tamen mi ne volas manĝi la pomon.

– Sed vi provu.

– Mi ne provos.

– Nu, almenaŭ iomete mordu.

– Vi mem mordu.

– Sed ĝi estas malbongusta.

– Ne, ege bongusta! – la azeneto ne cedis.

– Se bongusta, do, mi manĝu ĝin! – Gruntil ruzis.

– Ne, mi manĝu!



– Ne, mi!

– Ne, mi! – kolerigita azeneto Alfabet kriis, kaptis la pomon per la dentoj de sur la tablo kaj komencis plenapetite manĝi ĝin.

– Jen, vidu, – porkido Gruntil ridis, – mi tamen superobstinis vin! Mi igis vin formanĝi la pomon!

Oni diras, ke ekde tiu tago azeneto Alfabet ĉesis obstini.